

FEL



Iam ni trovos hejmon



Trevor Steele

Iam ni trovos hejmon

*Eldono de Flandra
Esperanto-Ligo*

n-ro 46 en la serio "Stafeto"



Tiu ĉi ekzemplero de *Iam ni trovos
hejmon* estas nekompleta versio. Ĝi povas
esti distribuata senpage.

***Iam ni trovos
hejmon***

romano de

Trevor Steele

Mi dediĉas ĉi tiun romanon al
mia edzino Katja
mia filo David
kaj Vera, Bob, kaj Andrew

Ĉapitro 1 – Musa

La tri ŝtonvizaĝaj viroj jam sidis, kiam la nervoza junulo eniris la grizan ĉambron. Ĉiuj tri portis blankan ĉemizon kaj probable malhelkoloran pantalonon. La solaj iom koloraj objektoj estis la kravatoj: unu ruĝa, unu blua, kaj unu flava. Estis klare, ke ili alterne skribos noticojn pri liaj respondoj.

„Eksidu, numero CEL 049.”

Estis pli ordono ol invito, kaj Musa jam sentis, ke ĉi tiu intervjuo estos same malbona kiel la antaŭaj. La tri reprezentantoj de la enmigra fako devigos lin ripeti la longan ĉenon da okazaĵoj, kiujn li preferus forgesi.

„Numero CEL 049, kiam vi naskiĝis?”

„Musa Ahmed Rambati, hazaro.” Li volis substreki, ke li havas nomon kaj tribon, ne nur numeron. Sed kiam li nervoziĝis, lia regado de la angla lingvo

ŝanceliĝis, kvankam li bone komprenis, kion aliaj diris al li. „E ... ne havi dokumento, sed naskiĝi jaro 1994. Mi 23-jara.”

„Hm,” diris la ruĝkravata viro. „Vi ne havas dokumenton. Tion diras multaj viaspeculoj. Ĵetis en la maron, ĉu? Ĉiukaze ni petas vin subskribi ĉi tie, ke vi diros al ni la veron, la tutan veron, kaj nenion krom la vero.” La viro glitigis paĝon antaŭ Musan.

„Subskribi?”

„Jes. Simpla afero por normala homo, ĉu ne?”

La subtono estis, ke Musa ne estas normala homo, sed jam delonge li strebis kreskigi karapacon kontraŭ tiaj insultoj de burokratoj.

„Jen. Nur subskribu.”

Musa, kiu antaŭ nelonge evoluigis latinlitteran subskribon, faris tion kaj reŝovis la paperon al la viro. La blukravatulo, kiu ŝajnis esti la plej altranga, transprenis. „Ni faros al vi liston da demandoj, kaj ni komparos viajn respondojn kun tiuj, kiujn vi donis antaŭ tri monatoj. Vi scias, ĉu ne, ke mensogoj aŭ

diverĝaj respondoj povos meti vin morgaŭ en aviadilon al Afganio?”

„Komprenas.”

„Do bone. Parolu al ni pri via familio kaj loĝloko en Afganio.”

„Mia vilaĝo bona ...”

Subite Musa estis refoje en sia vilaĝo en la Valo Bamjan. La fruaj jaroj de la vivo estis bonaj: li povis bildigi al si samaĝajn kamaradojn, kun kiuj li ludis futbalon sur ŝtona, senherba surfaco. Ĉiuj sciis, ke falo sur la ŝtonojn povus kaŭzi gravan vundon, do ili evitis faligi unu la aliajn. Musa iom post iom elektis ludi kiel golulo.

Dum ili ludis, li apenaŭ atentis la belan panoramon. Sed kiam li en trankvilaj momentoj rigardis la pejzaĝon, li vidis ĉirkaŭe altajn montojn, la pintojn tute nudajn somere – tamen kreskis arboj kaj arbustoj sur malpli altaj lokoj. Vintre la montoj estis neĝokovritaj, kaj de tie venis la akvo tiel necesa en la roka ĉirkaŭaĵo. Estis verdaj lokoj en valetoj, kaj la vilaĝanoj sukcesis vivteni sin per siaj bestoj kaj agrikulturaj produktoj. Musa amis la pejzaĝojn de sia hejmregiono, kaj tre

volonte grimpis sur montetojn. Sed lia patro avertis lin, ke li ne iru tro for; aliaj klanoj vivis transmuntete, kaj povis koleriĝi, se ili kredis, ke oni forprenas lignaĵojn aŭ aliajn aferojn, pri kiuj ili asertas posedon. Feliĉe Musa ne devis riski tiun taskon, kiun devis entrepreni knaboj de malriĉaj familioj, nome kolekti brullignaĵojn tie supre.

Pri alia danĝero en la montetoj kaj montoj ne necesis averti. Ĉiuj vilaĝanoj sciis, ke du knaboj perdis krurojn kaj vidpovon, kiam ili tretis sur kaŝitan eksplodilon. Tri aliaj knaboj mortis samkiale. Tiuj eksplodiloj, kiuj povis esti ie ajn, estis el „la rusa tempo”, sed ne eblis diri, ĉu ilin metis tien rusoj aŭ malamikoj de la rusoj. Oni nomis tiujn malamatajn detruilojn „minoj”. Lia patro parolis en sia tre emfaza kaj klara maniero al Musa pri tiu „rusa tempo”. Unuflanke neniu ĝojas, kiam fremdlandaj soldatoj, kun kiuj ne eblas komuniki, okupacias la landon. Aliflanke la hazaroj gajnis de tiu okupacio. Ambaŭ gepatroj de Musa rajtis studi kaj akiri diplomojn, kaj la virinoj kaj knabinoj ne

devis kovri sian tutan korpon kaj aspekti kiel troplenaj terpomaj sakoj.

La daŭra milito inter rusoj kaj ribeluloj, kiuj ricevis tre efikajn armilojn el Usono, estis ja brutala, sed kiam la soveta armeo iris hejmen, sekvis eble eĉ pli brutala periodo de bataloj inter diversaj klanaj militestroj, foje unu kontraŭ aliaj, foje kune kontraŭ nova grupo kun pakistana apogo, Talibaro. Fine Talibaro gajnis kaj komence oni esperis, ke tio metos finon al la violento, sed la taliboj montriĝis fanatikaj kaj brutalaj, kaj aparte virinoj suferis – kaj hazaroj kaj aliaj ŝijaistoj. Musa kompreneble kredis ĉion, kion diris lia patro, sed li ne komprenis, kial la homoj devas batali kaj malami. Kiam Musa estis ankoraŭ knabeto, li ofte aŭdis rakontojn pri tiu tago, kiam taliboj venis al ilia vilaĝo kaj alia en la valo. La brutaloj kun mitraloj marŝigis virojn el ambaŭ vilaĝoj, inkluzive la patron de Musa, fari grandan taskon. Tiuj timigaj taliboj nomis la ŝijaistajn hazarojn „herezuloj damnindaj”, sed ili bezonis helpon de la hazaroj. Poste oni eksciis, ke la fanatikuloj nepre volis detrui la gigantan

rokstatuon, kiu, oni supozis, staras jam de multaj jarcentoj. Unue ili pripafadis la statuon de Budho per mitraloj, sed la kugloj simple resaltis. Post tio ili pripafis la statuon per malpezaj kanonoj, kun apenaŭ pli kontentigaj rezultoj.

Necesis alia strategio. La estro de la taliboj do dekretis, ke hazaroj devos bori truojn en la statuon kaj enŝovi eksplodilojn. Por tion atingi, necesis, ke la hazaroj malsupreniru per ŝnuregoj de super la statuo, danĝera tasko, sed nu, ju malpli da herezuloj estas en la mondo, des pli bone. La taktiko sukcesis – kaj neniu el la hazaroj pereis – kaj la antikva rokgravuraĵo estis detruita.

Tre laŭdinda atingo survoje al konvertigo de la tuta mondo al la sola ĝusta fido.

La hazaroj tre bedaŭris tiun barbaran agon, sed almenaŭ ili ne estis surloke mortpafitaj. Ili tamen funebris pri la perdo de la milda giganto, la plej konata loĝanto de la valo.

Kiam Musa, intertempe sepjara, demandis sian patron, kial estas tiom da

problemoj en la lando – tre ofte oni aŭdis pri murdoj kaj bataloj – la patro klarigis, ke en la lando estas multaj diversaj grupoj, kiuj parolas malsamajn lingvojn kaj apartenas al diversaj branĉoj de islamo.

Estis paŝtunoj, taĝikoj, baluĉoj, uzbekoj – ĉiuj apartenis grandparte al la sunaistoj – kaj la propra grupo, la hazaroj, grandparte ŝijaistoj. Pro tiuj religiaj konfliktoj kaj la diferencoj de lingvo kaj kulturo, la hazaroj dum jarcentoj suferadis atakojn. Kaj la hazaroj havis iom alian aspekton ol la ceteraj, pli mongolecan. „Nenie ni estas sekuraj. Nur se ni restas en la propra grupo, ni havas ioman protekton,” diris la patro.

Kompreneble lia patro diris la veron, sed maltrankviligis Musan tiu situacio. Kial la homoj devas batali inter si? Kaj ĉu ili ne ĉiuj havas la saman Sanktan Libron?

Ali, la patro de Musa, ne havis bieneton sed estis la plej honorata viro en la valo: kuracisto, la unua edukita membro de la familio, kiu studis medicinon en Kabulo (en „la rusa tempo”) kaj bonvenigis helpon de eksteruloj, eĉ alilanduloj, por servi la homojn en tiu aride bela sed tre malriĉa

valo. La patrino Hazan, iom dika kaj tre agema virino, decidis, post kiam oni forĉasis Talibaron el la ĉefurbo – usonanoj kaj aliaj invadis la landon – ke ŝi instruos en eta lernejo (kiu antaŭe ne ekzistis). Kontraste al aliaj virinoj, Hazan sciis skribi kaj legi. Krome ŝi malfermis etan manĝaĵbutikon kun malaltaj prezoj, kion la vilaĝanoj tre bonvenigis.

Oni rakontis al Musa, ke siatempe lia avo ne rajtis edukiĝi en lernejoj, kaj do la sukceso de lia patro Ali tre fierigis la klanon. Kaj kiam la taliba registaro estis elpelita el Kabulo en 2002, Abdul, la pli aĝa frato de Musa, simile ambiciis studi medicinon. Abdul estis grandkreska, forta knabo, pri kiu ege fieris la gepatroj. Musa preskaŭ adoris sian grandan fraton. Li sciis ankaŭ, ke li mem apartenas al la plej klera familio en la vilaĝo, kaj li estis tre lernema – la unua en sia klaso. Li povis eĉ iomagrade legi la araban Koran-tekston, helpate de la patro.

Ali instruis sian filon pri multaj aferoj. Ekzemple, unu el la „sportoj” en tiuj vilaĝoj estis ĝismorta batalo de du hundoj.

Ali klarigis al Musa, ke tiu estas naŭza spektaklo, kiu insultas Alahon, kiu kreis ankaŭ la bestojn.

Sed tiu tre kontentiga familia vivo estis subite detruita. Kiam taliboj regis la landon, hazaroj estis ofte viktimoj de ilia fanatikeco. Kiam la homoj el aliaj landoj kaj la internaj malamikoj de Talibaro sukcesis forpeli la barbarojn el Kabulo en 2002, la taliba ombro tamen restis sur partoj de la lando, ofte en montaj regionoj. La Valo Bamjan ofte suferis pro iliaj agoj, kaj ili foje embuskis busojn kaj aliajn vehiklojn, kiuj uzis la aŭtovojon inter la valo kaj la ĉefurbo. Post ĉiu „operaco” de taliboj oni trovis kadavrojn apud la vojo aŭ en la vehikloj. La agintoj volis, ke oni sentu timon.

Hazaroj, herezuloj, estis „legitimaj” viktimoj, kaj ilia mongola-turka aspekto faciligis la „esplorojn” de la homoj kun mitraloj. Sed ankaŭ bone edukitaj homoj, eĉ paŝtunaj sunaistoj, estis en danĝero. Do ĉiu hazaro, kiu veturis laŭ tiu vojo, strebis aspekti nehazara kamparulo. Hazaroj devis

eviti paroli, ĉar eĉ kiam ili parolis paŝtune, ilia akĉento perfidis ilin.

Abdul ne povis fari abituran ekzamenon en la vilaĝo. Li vojaĝis al Kabulo kaj, sukcesinte ĉe ekzameno, li volis veturi buse hejmen. Li zorge vestis sin kiel simpla laboristo, sed forgesis, ke en poŝo de lia malnova malpura jako estas lia studenta karto.

La sekvo: taliboj haltigis la buson, trovis la karton, kaj tuj senkapigis Abdul. La dupeca kadavro restis en la buso kun du aliaj „ekzekutitoj”, kaj la ceteraj pasaĝeroj rakontis hejme pri la hororo.

Musa estis nur juna knabo, sed li forte memoris la doloron de la gepatroj. Kion ili faru? Ali la patro decidis pli spiti al la barbaroj, kaj vojaĝis al Kabulo por peti eĉ pli da medikamentoj de usona bonfara organizo. Dum kelkaj jaroj li faris tion, kaj la vilaĝo profitis.

Sed venis fatala tago. El la ĉefurbo li telefonis sian edzinon kaj raportis, ke lia vojaĝo estas tre sukcesa kaj li venos hejmen la postan tagon kun multaj utilaj medikamentoj. Kiel kutime, li finis sian

telefonvokon per, „Mi amas vin, Hazan.” Tamen Ali neniam revenis al la vilaĝo. Lia kadavro neniam estis trovita. Musa memoris, ke li kaj la patrino trovis tri kadavrojn apud la aŭtovojo, sed Ali, kontraŭe al la taliba kutimo, senspore malaperis.

„Hm, interesa rakonto,” la flavkravata burokrato interrompis la duone balbutatan rakonton de Musa. „Sed hodiaŭ Talibaro ne plu regas en Afganio. Kial vi estas en Aŭstralio – kial vi ne povas reiri al via lando? Vi ne estus en danĝero nun.” Musa rigardis la viron kun surprizo. Ĉu tiu sinjoro ne komprenas, ke hazaroj ĉiam estas en danĝero, ke taliboj daŭre plifortiĝas? Ĉu tiuj tri viroj, sidante en komfortaj seĝoj en mallibereja ĉambro, neniam aŭdis pri la masakroj far taliboj en Mazar-i-Ŝarif? Pri la murdo al miloj da hazaroj nur kelkcentojn da kilometroj for de Kabulo? Tiuj kravatportaj viroj, kiuj eble havis universitatajn diplomojn, ne sciis, ke la itinero inter Kabulo kaj Valo Bamjan havas la popolan kromnomon „Mortovojo”? Taliboj pacience atendis la

foriron de la alilandaj idolanoj; ili mokis siajn malamikojn per la diro „Vi havas horloĝojn, sed ni havas tempon.”

Musa sentis malvarmon en la tuta korpo, kiam li memoris sian doloran foriron el la valo.

En 2012 la patrino de Musa ricevis leteron, kiu akuzis, ke la familio kulpas pri kunlaborado kun usonaj nekredantoj. La sola maniero kompensi tiun kulpon estis, ke oni sendu al Talibaro la alian filon, Musan.

Hazan nepre volis savi la vivon de la filo. Musa devis eskapi el Afganio. Bonŝance ŝi havis iom da mono, sed kiel ŝi uzu ĝin? Iel virino el alia vilaĝo, ankaŭ ŝi relative bonstata finance, eksciis pri la turmento de Hazan. Ŝi vizitis Hazan kaj konfidis, ke ankaŭ ŝi, vidvino pro agado de taliboj, devas forsendi el la lando sian filon Gul.

Tiu virino, kies nomon Musa ofte aŭdos, proponis, ke Musa kaj Gul kune risku kaj apogu unu la alian.

Iun vesperon Hazan kaj ploris kaj estis iomete feliĉa. Ŝi kaj Fatima, la patrino de Gul, sukcesis pagi al grupo, kies specialaĵo

estis kontrabandi homojn al aliaj landoj. Kaj la patrinoj akiris pasportojn por siaj filoj. Hazan kudris \$1000 en faldaĵon ĉe jakoorlo kaj diris, „Uzu nur en krizo.” Ŝi klarigis, ke necesis prunti monon de amikoj, kaj ŝi ne estis certa, ĉu iam ŝi povos redoni la monon. Sed la vivo de ŝia filo valoris pli ol la tuta mono en la lando. Krome ŝi pakis vestojn en etan valizon. „Iru, mia filo! Tiuj senkoraj fanatikuloj nepre volas murdi vin! Mi volas, ke vi vivu kaj iam poste ni retrovos nin,” estis la ripetataj frazaj de Hazan la lastan vesperon, kiun Musa pasigis en la sola hejmo, kiun li konis.

Tiun nokton li dormis eĉ ne unu sekundon. Ke la patrino foje plorsingultas en sia ĉambro, li bone sciis. Miksaj sentoj batalis en li. Li tre bedaŭris la neceson foriri de la amata patrino, sed la aventuro fine vidi la eksteran mondon altiris lin. Kaj li sciis, ke resti hejme signifus baldaŭan morton. Se li havos normalan vivon, tio okazos ekster Afganio. Kiel eble plej frue li akiros monon kaj venigos Hazan al si.

Matene venis iom timigaspekta viro per aŭto. En la aŭto jam sidis Gul. Hazan unue ĉirkaŭbrakis Musan, sed tiam forturnis la kapon kaj diris „Bonan vojaĝon, mia kara filo.” Ŝi rifuzis solenan adiaŭon, agis, kvazaŭ Musa simple farus unutan ekskurson. Li estis iom konfuzita de tiu konduto, sciante, ke la koro de la patrino preskaŭ krevas. Kiam la aŭto ekveturis, Musa turnis la kapon. Kiel li atendis, Hazan tamen okule akompanis la foriranton kaj mansvingis kaj videble ploris.

Ĉapitro 2 – Zaina

Kiam Zaina estis eta knabino, ŝia plej amata homo estis Monir, ŝia avo. Kaj estis reciproke: Monir ofte atentigis, ke Zaina signifas belulino, kaj ke la nomo estas absolute trafa.

Monir iam estis instruisto, en la tempo, kiam eblis, ke rohinĝo havu tiun profesion, kaj la historio de Arakan estis lia pasio. Aliaj homoj trovis lian eternan rakontadon enuiga, sed Zaina tre atente aŭskultis, kvankam ŝi ofte ne povis plene sekvi la rakontojn.

Kiam Zaina naskiĝis, la „glora epoko”, pri kiu Monir entuziasmis, jam delonge pasis. Esti islamano en la ŝtato, kiun aliaj nomas *Rahine* – sed kies vera nomo, laŭ la avo, estas Arakan – signifis esti necivitano de Mjanmao – aŭ Birmo, kiel Monir insistis nomi la landon.

La patrino de Zaina, Nagina, estis pli ol kvardekjara kaj ne plu la svelta junulino, kiu iam tre altiris Hussain, ŝian edzon. Sed Nagina ricevis bonan edukadon de la propra patrino kaj tre bone parolis la birman lingvon, kio estis nekutima inter rohinĝoj. La unua filino de Hussain kaj Nagina estis Abla, aventurema knabino kaj vera heroino de Zaina. Inter Abla kaj Zaina naskiĝis knabeto, kiu mortis tre mallonge post naskiĝo. Eĉ en Maŭngdo, la plej granda urbo en tiu norda parto de *Arakan* kun centmiloj da loĝantoj, estis nur unu hospitalo, kaj ĝi estis malaltnivela. Ĉu en bona hospitalo oni povintus savi la vivon de la bebo? Lia morto estis granda bato al Hussain, kiu nepre volis havi filon kaj heredonton. Kiam Nagina gravediĝis la trian fojon, Hussain preĝis, ke naskiĝu knabo, ĉar rohinĝoj laŭleĝe rajtis havi nur du infanojn. Sed venis en la mondon Zaina. Tre juna la knabineto iel sciis, ke Hussain estas desapontita pri ŝia sekso, kvankam ĉiuj nomis ŝin vera belulino.

Zaina miris pri tiu vorto pri si mem: belulino. Laŭ ŝi Abla estis bela, sed ĉiuj

aliaj uzis tiun vorton pri Zaina kaj nomis Ablan „tro knabeca”. Hussain diris, ke beleco povas esti malbeno, ĉar multaj nedezirindaj viroj povus iam kvereli pri bela junulino. En siaj fruaj jaroj Hussain estis fiŝkaptisto en marborda vilaĝo, sed li ne estis tre bona en tiu rolo kaj havis tro da rivaloj. Do li decidis preni sian familion kaj sian patron Monir – lia patrino mortis relative juna – al antaŭurbo de Maŭngdo kaj starigi viandovendejon. Tio eblis, ĉar la budhistoj ne volis malpurigi siajn manojn per mortigo de bestoj. Kiel la rohinĝoj amare ŝercis, multaj budhistoj tamen volonte manĝis la viandon liveritan. Ĉar Hussain havis iom gravan postenon, li devis publike nomi sin birmamaniere Maŭng Maŭng. Tiu „rasa transformiĝo” estis relative facila. Kontraste al la granda plimulto de rohinĝoj, kiuj havas la brunan haŭton kaj fajnajn trajtojn de bengaloj, Hussain aspektis, same kiel la patro Monir, pli orientazia, pli pala kaj rondtrajta. Estis familia onidiro, ke la patrino de Monir seksumis kun suboficiro de la brita kolonia armeo, fakte el nerohinĝa tribo. Monir estis

ĝiskerne rohinĝa, sed ne aspektis tiel, kaj li heredigis tiun strangan avantaĝon al sia filo. Abla havis rondajn trajtojn sed tre brunan haŭton. Zaina estis knabino, kiun oni ne povis facile meti en iun ajn triban kategorion.

Abla estis fortvola infano, kiu foje malobeis la patrinon, kaj iris ludi kun budhistaj infanoj en aparta antaŭurbo. Sendube Nagina volis protekti sian knabinon de atakoj kaj provis malpermesi tiujn ludojn, sed Abla raportis, ke la infanoj estas bonaj kaj amikemaj. Sed iun tagon Abla ŝokiĝis, kiam du budhistaj knabinoj, kun kiuj ŝi ĝis tiam bone rilatis, subite nomis ŝin rohinĝa hundino kaj informis ŝin, ke iliaj gepatroj malpermesis, ke ili ludu kun ŝi.

Zaina estis obeema filino kaj ne aŭdacis iri kun Abla, sed ŝi sekrete admiris la kuraĝon de la fratino. Estis ofte enuige resti tuttage hejme kaj fari taskojn en la domo aŭ iri aĉeti etaĵojn. Sed jen la rolo de inoj, oni komprenigis al ŝi. Kiam ŝi estis pli aĝa, Zaina ofte iris helpi la maljunan vidvinon Fatima, sed neniam iris preter la limoj

indikitaj de Nagina. Multajn aferojn Zaina ne komprenis. Kial estas malamikeco inter rohinĝoj kaj budhistoj? Kial la budhistoj, kvankam minoritato en Maŭngdo, rajtas fari multajn aferojn, kiuj estas malpermesitaj al rohinĝoj? Kial homoj estas arestitaj, se ili havas libron en la lingvo de la rohinĝoj? Kial rohinĝaj infanoj ne rajtas iri al lernejoj? Kial la soldatoj ofte arestas rohinĝojn pro nenio kaj postulas pagon por ilin liberigi? Kial oni ofte aŭdas pri murdo de rohinĝoj far la soldatoj de la centra registaro?

Krome Zaina ne komprenis, kial Monir kaj Hussain iras en la moskeon, sed la virinoj kaj knabinoj ne. Ial ŝi intuciis, ke tiu seksa distingo estis decido de la rohinĝoj mem, ne ordono de la registaro. Cetere, Monir estis kredanta islamano, kiu preĝis kvin fojojn tage, sed Hussain estis pli leĝera en sia observado de religiaj devoj.

Jen alia strangaĵo: oni ne rajtis konstrui novan moskeon, nek aldoni al malnova, nek eĉ ripari kadukan moskeon. Kial? Ĉu avo

Monir povis klarigi tion kaj la multajn aliajn strangaĵojn?

Monir estis, malgraŭ sia reputacio esti tro babilema, bona instruisto, kaj ne troŝarĝis sian plej amatan lernantinon per troaj detaloj, dum ŝi restis tiel juna. Sed kiam pasis la jaroj kaj ŝia komprenpovo kreskis, li pli kaj pli regalis ŝin per detaloj el sia propra studkampo.

Li diris, ke iam ni rohinĝoj havis propran regnon Arakan, kaj ĝia glora epoko estis la tempo, kiun la britoj nomis la 15-a jarcento. La havenurbo Mrauk U estis perejo de komercaĵoj el foraj landoj, Eŭropo kaj Arabio. Poste venis portugaloj, kaj dumtempe ili regis, sed tiam venis la Konbaŭng-dinastio el Birmo kaj dominis Arakan. Tamen ankaŭ ili devis cedi al la granda mondopotenco, Britio.

Zaina provis memori tiun sinsekvon de detaloj, sed devis demandi, ĉu la rohinĝoj ne rezistis kontraŭ tio, ke aliaj homoj regas ilin. Ho jes, ni ribelis kontraŭ ĉiuj, ankaŭ la britoj, respondis ŝia avo, sed ni ne estis sufiĉe fortaj.

La britoj, li diris, faris el ni parton de sia Hinda Imperio, kaj poste, kiam ili venkis Birmon, ili metis nin en tiun kolonion. Pro tio la nuna birma registaro asertas, ke ni ne estas parto de Birmo. Sed la britoj ne diskriminaciis nin, fakte ili donis al ni kelkajn privilegiojn. Zaina ne konis tiujn longajn vortojn, sed divenis la signifon. Ja, diris Monir, kiam la japanoj venkis Birmon, ni batalis por la britoj. La mog preferis la japanojn.

Zaina bone konis tiun vorton mog, kiu signifis la budhistojn. Ŝajnis, ke pri ĉia ajn temo la rohinĝoj kaj la mog kverelas. Monir komencis respondi rekte al la demandoj de la knabineto. Vidu, li diris, post la granda milito Birmo sendependiĝis. La unua reganto, Ne Win, estis iom bona homo kaj permesis multon al la rohinĝoj, kion la postaj regantoj ne permesis. La generaloj puĉis kaj persekutis la rohinĝojn kaj provis devigi ilin forlasi Birmon. Ili nomis la rohinĝojn bengaloj kaj asertis, ke ili ne rajtas vivi en Birmo, ke ili enbloviĝis el fremda lando. Rohinĝoj perdis

civitanecon kaj havis nenian protekton kontraŭ la krimoj de la registaro.

Zaina provis kompreni la multajn detalojn, sed restis demando. „Avo, kial la registaro faras malbonajn aferojn al ni kaj ne al la *mog*?”

„Aŭskultu, mia karulineto, la militistoj scias, ke neniu voĉdonis por ili, ili simple *uzurpis* la potencon en la lando. Sed ili volas, ke la *mog* vidu en ili protektantojn de la budhistoj. Kaj tiuj frenezaj budhistaj monaĥoj ofte okazigas atakojn kontraŭ ni, kun helpo de la soldatoj. Kaj kiam la soldatoj bruligas rohinĝan vilaĝon, mortpafas virojn, seksperfortas virinojn, kaj forĉasas ĉiujn, ili proponas eĉ financi setladon de malriĉaj *mog* en tiu vilaĝo. Kaj kompreneble la *mog* apogas la militistaron. Dank’ al tiuj uniformitoj ili ne plu estas ĉe la malsupro de la socio: ili estas superaj al tiuj „islamaj alilanduloj”.

Monir klarigis, ke la registaro estas sufiĉe inteligenta por realigi sian planon nur iom-post-iom. Unue la rohinĝoj rajtis vojaĝi, sed nur interne de Birmo. Iom poste ili rajtis vojaĝi nur interne de *Arakan*. Kaj

nun ili bezonas specialan permeson por vojaĝi preter la limoj de sia urbo aŭ vilaĝo.

Estis unu escepto al tiuj reguloj.

Rohinĝoj rajtis viziti Bangladeŝon (ilian asertatan „hejmlandon”) dum 48 tagoj. Sed ne malofte ili ne rajtis reveni en *Arakan*.

Kaj konstante sed ne tre rapide venis novaj leĝoj, kiuj limigis la vivon de la rohinĝoj. Se estis iu disputo inter budhisto kaj rohinĝo, la budhisto ĉiam gajnis. Kaj la generaloj lanĉis edukprogramojn, laŭ kiuj la forto de Birmo estas la pureco de la birma sango. Ke en la lando vivas multaj diversaj gentoj, nur spronis la instrufervoron de speciale nomumitaj instruistoj. Kiam Zaina estis jam 16-jara, okazis „censo”, nombrado de la loĝantoj. Soldatoj venis en la domon de Hussain, unue manĝis la jam pretajn aferojn sur la tablo, serĉis valorajn objektojn por ŝteli, kaj okulumis la knabinojn.

Nagina riproĉis ilin en perfekta birma lingvo, ke tiaj fiaĵoj ne apartenas al ilia tasko. Ŝia forto evidente faris impreson, kaj tiam ili ŝajnis esti seriozaj esplorantoj. Ili postulis, ke Hussain nomu ĉiujn homojn en

la domo, kaj ili demandis, kiu dormas kun kiu – ĉu maljuna Monir metas sian ilon en la du junulinojn? Nagina ne interesis ilin, sed ili postulis, ke Abla kaj Zaina forigu siajn kapkovrilojn kaj eksterajn vestojn, kaj ili longe kaj ĝue rigardis la hontantajn knabinojn.

„Ej jej,” diris soldato, „vidu, eĉ en merdostako oni trovas juvelon.” Li fingromontris al Zaina, kaj aldonis, „La venontan fojon mi donacos al ŝi,” kaj li tuŝetis la pantalonparton antaŭ sia penis. La aliaj soldatoj ridegis pri tiu duonŝerco. Post tio ili ordonis, ke la tuta familio pozu por foto, kaj registris ĝin kiel „familio Maŭng Maŭng”. Se estos iu ajn ŝanĝo en la familio, tio estos tuj raportenda. Neanoncita ŝanĝo estos severe punita. Se venos vizitanto, tion oni tuj anoncu al la polico. Restis unu lasta amuzaĵo. La soldato, kiu ordonis al la aliaj, demandis Hussain, „Kia estas via raso?” Kiam neniu respondo venis, li kriis, „Bengalo!” Hussain ripetis, „Bengalo.”

Ankaŭ Nagina devis diri, ke ŝi estas bengalino.

Abla diris, kiel eble plej sarkasme, „Mi ... a ... bengalino.” La soldato kolere alkriis ŝin, „Jes, hundinaĉo, vi estas bengalino. Ripetu!” Nedezirante krei pliajn problemojn por la familio, Abla diris, kvazaŭ pistite de amara vero, „Mi estas bengalino.” „Kaj vi?” la soldato turnis sin al Zaina. „Bengalino,” ŝi diris mallaŭte.

„Pli da entuziasmo!” postulis la soldato. „Kia estas via raso?”

„Bengalino.”

„Kaj vi, grizbarbulo,” la soldato fingromontris al Monir kaj sarkasmis, „ĉu ankaŭ vi apartenas al tiu altvalora raso?” Monir, la iama instruisto, kiu parolis la birman pli elegante ol la soldatoj, respondis degne, „Se via moŝto insistas.” „Mi insistas!” roris la soldato.

„Do, tiukaze jes.”

„Ripetu la nomo de la rasaĉo, al kiu vi apartenas!”

„Bengala.”

„Kaj neniam forgesu tion, vi ĉiuj!” kriis la soldato, kaj tiam li ordonis al siaj subuloj iri al la najbara domo. Rohinĝoj loĝantaj en Maŭngdo estis relative sekuraj, ĉar ili estis

granda plimulto de la loĝantaro. Tio estis ĝenerala en la norda parto de *Arakan*, proksime al la limo kun Bangladeŝo. Sed laŭ rakontoj la rohing'aj kamparuloj, kiuj heredis bienetojn de multaj generacioj de antaŭuloj, estis en terura situacio. Ne nur, ke ili havis ege primitivajn ilojn kaj nenian helpon de la registaro; tuj apude estis soldataj kazernoj. Do iam ajn la rohing'oj povis esti atakitaj, sed ne ĉiuj samtempe. Oni neniam sciis, kiam venos tiuj murdemaj taĉmentoj. Kie estis najbaraj budhistoj, la soldatoj instigis ilin malami la rohing'ojn kaj foje invitis ilin partopreni en „purigaj operacoj”.

Pliagaj rohing'oj kutime rezignis agi kontraŭ la maljustaĵoj kaj provis laŭeble eviti personan persekutadon. Tamen inter la junaj viroj bolis kolero kaj venĝodeziro. Ili sekrete formis sindefendajn grupojn. Ili bone sciis, ke aliaj minoritataj gentoj, ekzemple la karenoj, jam delonge batalas kontraŭ la centra registaro, sed kunlaboro inter la rezistgrupoj apenaŭ okazis. De tempo al tempo grupo da rohing'oj atakis kazernon, mortigis kelkajn soldatojn, kaj

provis eskapi. Tio ĉiam havis la sekvon, ke ankoraŭ pli da rohingaj vilaĝoj suferis en multe pli granda grado. Kompreneble tio spronis la junajn rohingojn, se ili restis nekaptitaj, deziri venĝon. La ciklo de violento daŭre rondiris.

Abla iam diris al Zaina, ke iam ŝi mem iros al la rezistantoj kaj uzos pafilon kontraŭ la brutaloj. Tio ŝokis Zainan; jes, ŝi nun bone komprenis, ke ŝi vivas en mondo de maljusteco, sed mortpafi aliajn homojn estis ekster ŝia imagopovo. Malgraŭ ĉio ŝi volis kredi, ke eĉ inter la mog estas bonaj homoj. Aliflanke ŝi iom komprenis, ke la situacio en multaj landoj estas pli bona, kaj ŝi revis viziti aliajn landojn. Sed kiu rohingino povus tion atingi?

Kiam Zaina iĝis 18-jara oni pripensis edzinigi ŝin. Ja estis multaj junuloj, kiuj volonte vivus kun tiu tre bela knabino, kiu krome ŝajnis sobra kaj milda homo. Zaina diris al sia patrino, ke ŝi volas mem elekti sian edzon, kaj Nagina, kiu evidente amis Zainan pli ol la iom ribeleman Ablan, promesis, ke se la patro provos devigi Zainan edziniĝi al nedezirata viro, ŝi,

Nagina, kontraŭos tion. „Ni virinoj havas malmultajn rajtojn, sed ni povas havi fortan influon,” ŝi flustris. „Via patro scias, ke mi estas pli fortkaraktera ol li.”

Tio tre plaĉis al Zaina, ĉar ŝi ne ĝuis la sperton esti daŭre okulumata junulino. Ŝi ne povis imagi feliĉan vivon kun iu ajn el la ĝistiamaj kandidatoj.

Kaj tiel estis, ĝis iun tagon ŝi konatiĝis kun Ibrahim. La renkontiĝo okazis surstrate. Zaina ĵus aĉetis kelkajn pezajn manĝaĵojn por la familio, kiam seriozaspekta juna viro kun plaĉa voĉo demandis ŝin, kie li trovos viandovendejon. Zaina ridetis kaj diris, ke ŝi povos gvidi lin tien, ĉar ĝi apartenas al ŝia patro.

Ili ekiris kune, kaj Ibrahim rimarkis, ke la aĉetkorbo de Zaina estas vere peza. Li elegante prenis ĝin el ŝiaj manoj, kaj ŝi ridetis refoje. Kaj subite ŝi pensis, ke tiu viro ja tre plaĉas al ŝi. Ŝi faris ion, kies „impertinenteco” surprizis ŝin: ŝi diris al li sian nomon kaj demandis, kiun nomon li havas. Ŝi havis la impreson, ke ankaŭ Ibrahim ĝuas ilian kunestadon.

Ili atingis la butikon de Hussain, kaj Zaina, ree surprizita de la propra iniciato, anoncis al la patro, ke la vizitanto havas la nomon Ibrahim, kaj ŝi diris al Ibrahim, ke ŝia patro estas Hussain. Ŝia konduto surprizis ankaŭ Hussain, kaj li ĵetis rigardon al Ibrahim kaj pripensis. Li paroligis Ibrahim, kiu estis io tre nekutima inter rohinĝoj, medicinstudento en la Universitato de Dagon en Ranguno. Hussain tuj komprenis, kiam Ibrahim diris „Ranguno” kaj ne „Jangono”, ke Ibrahim estas rohinĝo. Sed studento, kiel tio eblis? Ibrahim ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ por certigi, ke neniu subaŭskultas, kaj konfesis sekreton, ke li parolas ankaŭ la birman kaj havas falsan birman identigilon.

Ĉiuj tri sciis, ke dirante tion, Ibrahim metas sian sorton en iliajn manojn. Se ili raportus pri tio al policejo, la kariero de Ibrahim – kaj lia libereco – estus finita. Kaj Hussain ricevus monpremion de la polico. Kiam la reciproka fido estis establita, la juna viro konfesis, ke li ne komprenas, kio impulsis tiun konfeson, sed ke li instinkte sciis, ke li povas fidi Hussain – kaj Zainan.

Same impulse Hussain diris, ke tre baldaŭ li finos la laboron, kaj se Ibrahim akceptas, li estas invitita vespermanĝi kun la familio. Ibrahim hezitis dum momento, kaj Zaina preskaŭ preĝis, ke li diru jes. La preĝo ne necesis. Ibrahim diris, ke li estas gasto de onklo, kiu same kiel Ibrahim pozas kiel budhista. Ibrahim kredis, ke la onklo ne protestos, se Ibrahim liveros al li la viandon aĉetitan kaj poste iros al la adreso de la familio de Hussain.

Refoje Zaina surprizis sin kaj la patron. „Paĉjo, mi akompanos Ibrahim al lia onklo kaj poste gvidos lin al nia domo.” Kaj tiel estis. Ibrahim estis ja neregistrita vizitanto, sed ĉar li havis falsan identigilon kiel budhista kaj loĝis ĉe homo oficiala budhista, li ne timis areston. Ankaŭ la onklo havis falsan birman nomon: Thant.

Ĉapitro 3 – Musa

„Do, vi foriris, vi diras, en aŭto de kontrabandisto. Ĉu vi ne scias, ke tiuj kontrabandistoj agas kontraŭleĝe?” la ruĝkravatulo akuzis.

„Sinjoro, ne voli morti! Kio fari? Resti en Valo Bamjan – Talibaro tratanĉi gorĝo ...”

„Vi devos pruvi, ke vi ne mensogas. Do daŭrigu vian rakonton.”

La du knaboj Gul kaj Musa sidadis silentaj en la aŭto, ambaŭ perditaj en la propra pensomondo. La nigraokula viro veturiganta la aŭton diris nenion. Ĉu tiel komenciĝas granda aventuro?

Post tre longa tempo, ŝajne, ili atingis la flughavenon de Kabulo. La kontrabandisto silente transdonis al ili flugbiletojn kaj alpinglis al iliaj jakoj slipeton da blua papero. Li interrompis sian silenton por averti, ke ili ne forigu la slipeton sed vidigu

ĝin al la oficistoj de la flughaveno. Tiu slipeto estas grava, li emfazis. Poste li diris nenion plu.

Baldaŭ Musa komprenis. La doganistoj kaj pasportkontrolistoj vidis iliajn slipojn kaj simple gestis, ke ili iru pluen al la aviadilo. Bone organizita operaco, kaj li supozis, ke ankaŭ tiuj oficistoj akiros iom el la mono de la du patrinoj. Ĉiukaze la knaboj estis direktitaj al la grandventra flugmaŝino, kie bela stevardino ridete akompanis ilin al iliaj sidlokoj. Pasaĝeroj venadis, ĝis la sidlokoj estis preskaŭ ĉiuj okupitaj.

La brua aviadilo rampis malrapide sur la asfalta kurejo, sed subite muĝe akcelis antaŭen kaj iom post iom gajnis sufiĉan rapidecon por leviĝi. La videbla tero poiome sinkis sub ilin. Gul kuntiriĝis, lia vizaĝo montris teruron. Musa metis manon sur la ŝultron de sia kunulo kaj parolis tiel aplombe, ke li mem miris.

Li certigis Gul, ke la flugkompanio havas bonan reputacion, ke la piloto estas tre lerta, ke ilia flugo estos glata rutinaĵo. En tiu momento Musa konsciis, ke li imitas

sian patron per tiu memfida babilado – kvankam li havis nenian ideon, ĉu liaj diroj pravas. Do ĉu foje eĉ lia patro trankvile rakontis aferojn, pri kiuj li ne estis certa?

Bonŝance Gul iam dum la flugo ekdormis, do Musa, kiu jam sentis respondecon pri la timema knabo, permesis al si ekdormi.

„Kien vi flugis?” demandis la viro kun la flava kravato.

Kiam la aviadilo surteriĝis, la knaboj unue havis nenian ideon, kie ili troviĝas. Ili sekvis la homfluon kaj troviĝis en granda konstruaĵo. Estis amasoj da homoj, plejparte kun bruna haŭto, kaj ŝajnis, ke diversaj lingvoj aŭdeblas. Estis afiŝoj, ankaŭ ili diverslingvaj, sed Musa juĝis, ke la latinliteraj tekstoj devas esti en la angla. La du knaboj sendube aspektis kiel perditaj animoj en fremda loko, do virino kun plaĉa mezaĝa vizaĝo flustris al ili, „Ni estas en Delhio, Hindio.”

Musa dummomente preskaŭ panikiĝis: la kontrabandistoj jam havis la monon – eble ili simple lasos lin kaj Gul en tiu timiga fremda lando. Li ĵetis rigardon al la

bluaj slipetoj sur iliaj jakoj, kiuj iel rolis en la tuta afero. Eble necesis daŭre montri tiujn, ĝis iu komprenos, kiuj ili estas.

„Gul,” flustris Musa, „ne kaŝu tiun papereron.”

Kiam fine la knaboj eliris el la aviadilo kaj trairis la kontrolojn, ili staris senkonsile en la vasta atendejo. Subite ridetanta viro kun kapkovraĵo neniam antaŭe vidita kaj tre blankaj dentoj aliris ilin. „Afghanistan?” li demandis, rigardante la bluajn slipojn.

Ambaŭ knaboj kapjesis.

La viro fingromontris al si kaj diris, „Venkateŝ.” Li fingromontris al ili kaj evidente petis, ke ili sin nomu.

Ili sin prezentis, kaj Venkateŝ gestis, ke ili sekvu lin.

Post longa marŝo ili atingis malgrandan aŭton, kaj Venkateŝ gestis, ke ili eniru.

Venkateŝ veturigis dum multaj minutoj laŭ kelkaj ĉefstratoj. Musa provis perdiĝi en la sennombraj svarmaj novaj scenoj, homoj, domoj, bovinoj, plantoj, bruoj; li havis la impreson, ke Gul retiriĝis en sin, nekapabla eliri el siaj timoj.

Fine ili flankeniris en kvartalon, kie dominis riparejoj, fabrikoj, kaj iom kadukaj oficejoj. Tie la afiŝoj estis ne plu latinliteraj. Musa jam akiris iomete da scio pri la angla lingvo kaj ĝia alfabeto, sed la simboloj en tiu regiono estis absolute nekompreneblaj al li.

La veturo finiĝis antaŭ malbela griza domo. La tri homoj elaŭtiĝis kaj Venkateŝ mimis manĝadon. „*Yes please ...*” Musa diris, subite tre malsata.

Ili eniris la domon. Venkateŝ signalis, ke li iros aĉeti ion por manĝi kaj trinki, kaj li gestis, ke la knaboj nepre restu en la domo. Li foriris, ŝlosinte post si la pordon.

Estis tre mallume en tiu domo, entute estis griza etoso. Nenio interesa aŭ eĉ utila videblis, se oni ne kalkulis la truon en la planko, kiu servis kiel necesabo. La knaboj, lacaj post tiom da sidado, serĉis seĝon aŭ ion alian, sur kiu sidi, sed fine ili sidis sur la malpura planko kun la dorso al muro.

„Mi esperas, ke ni ne longe restos ĉi tie!” grumblis Gul. Almenaŭ li ne plu tremetis pro timo.

Estis ne nur mallume en la domo, estis ankaŭ ŝvitige varme. Ŝajnis al la knaboj tre longa tempo, antaŭ ol Venkateŝ revenis kaj metis antaŭ ilin kelkajn manĝaĵojn kaj botelon da akvo. Senvorte li eliris, ŝlosis la pordon de ekstere, kaj forveturis. Musa kaj Gul luposimile manĝis, kvankam la fremdaj gustoj ne plaĉis, kaj poste eltrinkis la botelon. Ili esperis, ke baldaŭ Venkateŝ revenos kun io pli bongusta. Ĉu ekuzi la dolarojn kaj mendi ion pli manĝindan? Musa sin demandis, ĉu Gul havas monon, sed ial la demando ŝajnis malĝentila.

Dum ili atendis, Musa demandis Gul pri lia familio kaj la motivo de lia fuĝo el Afganio. Gul rakontis pri la terura morto de sia patro Hossain, kiun taliboj trapikis per glavo antaŭ lia propra domo. Fatima, lia patrino, venis de iom riĉa familio el fora valo, kaj ŝi sukcesis aĉeti pasporton por Gul kaj pagi al la kontrabandista grupo. Gul dubis, ĉu ŝi ankoraŭ havas pli da mono ol la malriĉuloj de la vilaĝo.

Musa juĝis, ke Gul estas sentema junulo, fakte muzikema kaj kantema. Li estis malpli altkreska kaj malpli

muskolhava ol Musa, kiu sentis, ke li nun transprenas la taskon gardi Gul kontraŭ la danĝeroj, kiuj sendube alfrontos ilin.

Venkateŝ ne revenis tiun tagon, kaj kiam li venis la postan matenon, li sternis kelkajn manĝaĵojn kaj alian akvobotelon sur la plankon. Musa volis demandi lin, kiam ili povos foriri el tiu domo kaj kien ili iros, sed ne eblis komuniki lingve kun la hindo, kiu siaflanke tute ne emis klarigi. Li foriris kaj ŝlisis la pordon. Dum la pordo estis malfermita, la brilo de la suno preskaŭ blindigis la afganojn, kiuj intertempe kutimiĝis al la malhela etoso de la domo.

Musa kaj Gul cerbumis pri la fina celo de ilia vojaĝo. Resti en Hindio, tiu lando, kie ĉie estis tro da homoj – kia kontrasto al iliaj vilaĝoj! – estis nekontentiga perspektivo. Sed kien iri? Al kiu lando? Kie eblos trovi laboron kaj enspezi por venigi siajn patrinojn?

Fakte ili restis plurajn tagojn en tiu seninteresa griza konstruaĵo, kaj nur matene Venkateŝ, kiu ŝajnis malkontenta pri io, venis kaj plumpe liveris la nedezirindajn sed necesajn manĝaĵojn. Ankaŭ la akvo

havis malagrablan guston, sed ili nepre bezonis likvaĵon.

La humoro de la knaboj iom post iom malboniĝis. Ial ili apenaŭ parolis inter si, kvankam pensi kaj paroli estis la solaj eblaj aktivaĵoj en tiu neelektita loko.

Post kvin aŭ ses tagoj – ili vere ne plu sciis nombri ilin – alia viro venis, ne Venkateŝ. Tiu viro malafable gestis, ke ili prenu siajn aferojn kaj eniru la aŭton starantan antaŭ la domo. Kiam ili eliris, ili devis ŝirmi la okulojn kontraŭ la sunlumo. Kaj Musa subite sentis, kiel malpuraj estas liaj vestoj, sed li ankoraŭ ne volis surmeti aliajn, kaj apenaŭ havus sencon peti, ke tiu mornvizaĝa viro helpu.

Kiam ili sidis en la aŭto, la viro diris nur unu vorton, kiun Musa komprenis: *airport*, kaj iom poste li aldonis: *passport*. Kaj la viro fingromontris al la bluaj slipetoj sur iliajn jakoj kaj gestis, ke ili ne demetu la slipetojn. Do nun ili flugos al alia lando. Sed kien?

„*Hindio, ej?*” diris iu el la tri oficistoj.
La ruĝkravatulo trafolumis staketon da

paĝoj kaj gruntis, „Ĝis nun via rakonto ne diverĝis. Do kien vi iris de tie?”

Ĉar la aviadilo, kiun ili eniris, estis hinda, la knaboj ne povis diveni, kien ili iras. Ili ricevis du el la plej etkostaj sidlokoj, sed tion ili atendis. Musa ekkomprenis, ke lia patrino kaj la patrino de Gul devis multon elspezi por aĉeti eĉ tiujn lokojn. Kiam la aviadilo fine deteriĝis, Gul subite diris al Musa, „Ni devas celi iri al Aŭstralio. Mia patro, antaŭ ol taliboj murdis lin, diris al mi, ke Aŭstralio estas granda lando kun malmultaj homoj, kiuj vivas en paco. Li diris, ke estas jam hazardaj komunumoj tie.”

Musa iom miris. Ĝis tiam Gul apenaŭ diris ion ajn. Ĉu li parolis nur por venki sian timon pri la danĝeroj flugi? Kiel ajn, la ideo ŝajnis bona ankaŭ al li. Lia lakona komento estis, „Jes, ni iru al Aŭstralio.”

Tiam venis la penso: eble tiu ĉi flugo prenos nin al tiu granda lando kun malmultaj loĝantoj. Se jes, mi tuj serĉos laboron, ian ajn laboron, kaj ŝparos monon por venigi mian patrinon tien. Kaj samtempe mi volas studi, eble iam en

universitato. Jes, mi volas iri al Aŭstralio!
Kaj nepre mi lernu la anglan lingvon.

Tiu perspektivo ekscitis Musan. Li devis lerni pli pri tiu mistera lando, kiu estas ankaŭ kontinento. En lernejoj en Afganio oni malofte menciis tiun landon, kaj Musa supozis, ke malmultaj lernejoj povus eĉ fingromontri ĝin sur mapo de la mondo.

La konstanta zumado de la aviadilo iom post iom dormemigis la knabojn. Post tiuj tagoj en la mizera malluma ĉambro sen mebloj eĉ la preme kunpuŝitaj sidlokoj de la aviadilo estis pli-malpli komfortaj.

Musa ne memoris multon el tiu flugo. Subite ili surteriĝis kaj li povis deĉifri, ke ili estas en Kuala-Lumpuro. Ĉu Indonezio? Ĉu Tajlando? Ne, subite li memoris, ke ili estas en Kuala-Lumpuro, la ĉefurbo de Malajzio.

„Do, CEL 049, Malajzio, vi diras? Kion vi faris tie? Kiom da tempo vi restis?”

„Musa Ahmed Rambati, hazaro,” spite ripetis Musa, sed decidis gluti sian koleron, ĉar tiuj viroj povas resendi lin al morto en Afganio.

Musa havis nur nebulajn bildojn en sia kapo pri Kualalumpuro. Li kaj Gul vagis kvazaŭ perditaj ŝafidetoj, simple sekvante la fluon da la homamaso, ĝis ili troviĝis ĉe giĉetoj de doganistoj kaj pasportkontrolistoj.

La viro deĵoranta ĉe la pasportkontrolejo ĵetis rigardon al la bluaj slipetoj sur la jakoj de la knaboj, stampis la pasportojn, kaj diris simple sed emfaze, „Transit, wait,” kaj ŝultroindikis al pasejo maldekstre.

Musa ne komprenis la vortojn, sed divenis la signifon. Evidente ankaŭ tiu oficisto estis ero en la kontrabandista ĉeno. Li gvidis Gul maldekstren kaj vidis, ke jes, estas granda atendejo kun tiu mistera vorto TRANSIT.

La du knaboj ne longe sidis, antaŭ ol aperis alia viro, kiu okulserĉis kaj diris al si „Aha!” Li rekonis la slipetojn.

Sekvis iom kompleksa provo de la viro klarigi la situacion. Fine li transdonis al la knaboj flugbiletojn kaj diris, „Indonezio.” Sur papero li skribaĉis 14h. Liaj gestoj igis klare, ke la du restu en la atendejo kaj flugu

pluen per alia aviadilo je la dua horo posttagmeze.

Granda horloĝo informis, ke estas nur la 10-a horo matene, do necesis atendi plurajn horojn. Kaj kion manĝi kaj trinki? Gul fine elfiŝis el jakopoŝo monbileton, 10 usonajn dolarojn. Surprizis Musan, ke nur nun li montras, ke li havas monon ĉe si, sed li estis dankema, ĉar li mem havis nur \$1000 elspezotajn nur en krizo. Gul eble havis pli en sia poŝo, ĉar li proponis aĉeti ion por ili ambaŭ. Estis lia unua iniciato, kaj Musa komprenis, ke Gul sentas, ke li ŝuldas dankemon al la pli granda knabo pro la ĝistiamata protektado. Kaj vere, pensis Musa, por Gul la tuta afero estus koŝmaro, se li estus sola.

Do Musa restis en la atendejo, dum Gul vagis, ĝis li trovis butiketon. Li revenis kun bulkoj kaj kafo en plastaj tasoj. Poste la du knaboj babilis refoje pri siaj familioj. La doloro perdi la patron estis komuna, kaj krome Musa perdis sian amatan fraton. Malamo al la taliboj kaj nekompreneo de ilia krueleco estis alia komunaĵo.

Surprizis Musan, kiam li konstatis, ke estas jam la unua kaj duono. Ili devis rapidi por ne maltrafi la flugon al Ĝakarto.

Poste li apenaŭ memoris ion ajn pri la flugo al la indonezia ĉefurbo. La monotona zumado de la maŝino ree endormigis lin. Gul ne dormis, sed lia antaŭa timo pri flugado ŝajnis venkita.

„Ĝakarto. Vera mondvojaĝanto. Nu, kio okazis tie?”

Ankaŭ pri Ĝakarto Musa malmulton memoris krom la daŭra varmego kaj humideco: lin kaj Gul oni liveris al etkosta hotelo, kie aliaj hazaroj kaj kelkaj irananoj loĝis. Evidente malluksa provizora loĝloko por trapasantoj. La du knaboj pasigis nur du tagojn tie. Ekster la hotelo ili aŭdadis laŭtajn stratbruojn kaj konstantan bruadon de aŭtoj kaj motorcikloj, kaj Musa supozis, ke Ĝakarto estis eĉ pli granda ol la urbo en Hindio. Estis tamen bone povi paroli la propran lingvon kun Ali.

Ali, mildaspekta hazaro, klarigis, ke en Indonezio li kaj aliaj rifuĝintoj estas tolerataj, kaj mondonacoj de internaciaj organizoj vivtenas ilin, sed ke la lando ne

proponas perspektivojn de kontentiga laboro kaj vivo. Ili ne rajtis labori, kaj infanoj ne rajtis iri al lernejo. Ĉiuj esperis iri alilanden. Eble al Kanado.

„Sed estas nia plano iri al Aŭstralio,”
Musa enmetis iom fiere.

„Ĉu vi havas \$2500 por aĉeti
flugbileton?” demandis Ali.

Musa rigardis Gul, kiu kapneis.

„Ne, ni ne havas tiom.”

„Tiukaze vi devas trovi boaton, kiu
prenos vin tien. Ankaŭ tio povas esti
multekosta. Dependas de tio, kiu aranĝos la
veturon.”

Tiumomente alia hazaro eniris la
konversacion. „Per boato? Tro danĝere!”

Ali apogis la vortojn de Abdul, la nov-
alveninto. „Multaj homoj jam mortis en la
maro. Kaj la homoj, kiuj transportas per
boato, estas ofte krimuloj. La
ĉefkontrabandistoj mem ne riskas veturi per
tiuj kadukaj boatoj, ili dungas simplajn
fiŝistojn, kiuj ne plu povas vivteni sin per
sia tradicia metio. Kaj tiuj fiŝistoj foje
eskapas per motorboato kaj lasas la
pasaĝerojn droni. Mi aŭdis eĉ pri kazoj,

kiam la ‘maristoj’ murdas la pasaĝerojn.
Ne, mi ne iros boate!”

Ali rakontis, ke ankaŭ li volas iri al Aŭstralio aŭ Kanado. Sed li diris, ke li preferas atendi, ĝis UNHCR, la migra fako de UN, deklaras lin aŭtenta rifuĝinto, kaj tiam li serĉos manieron atingi Aŭstralion – oficiale. „Kaj se vi estos arestita de indoneziaj patrolŝipoj, vi estos deportita al Afganio aŭ enkarcerigita ĉi tie. KREDU MIN, laŭ ĉiuj, kiuj tion spertis, esti en indonezia malliberejo estas speco de surtera infero.”

Abdul grimacis. „Ne estas bona alternativo. Vi scias tion, Ali. Vi petas intervjuon. Tiam vi atendas ses monatojn, eble unu jaron. Oni intervjuas vin. Eble jaron poste vi ekscios, ĉu vi estas aŭtenta azilpetanto aŭ ne. Se vi estas agnoskita, vi devas atendi eble du-tri jarojn – eble dudek – ke iu lando akceptu vin.”

Post morna paŭzo Abdul aldonis. „Nur Alaho povas helpi. Ĉu vi scias, ke la aŭstralia registaro tamtamas la mesaĝon, ke homoj, kiuj venas al ĝia lando per boato, neniam rajtos vivi en Aŭstralio.”

Gul, kiu malofte parolis, subite sonis konvinkita de sia propra vidpunkto: „Mia patrino diris al mi, ke Aŭstralio estas tre granda lando kun malmultaj homoj kaj bezonas enmigrantojn, do ...”

Sed lia voĉo perdis la aplomban tonon, kaj neniu komentis.

La humoro en la hotelo estis sombra.

Sed la postan matenon la knaboj estis pli optimismaj. Kiu povas vere scii, kion la aŭstralia registaro intencas? Registaroj ofte blufas, mensogas. Junaj homoj ne akceptu tiajn vortojn, kiuj ja povus ŝanĝi venontsemajne.

Grava evento en Ĝakarto estis, ke fine ambaŭ knaboj aĉetis poŝtelefonojn. Musa parolis dum dek minutoj kun sia patrino, kaj ili ambaŭ ploris kaj parolis samtempe. Ankaŭ Gul parolis kun sia patrino.

La ĉefa afero, Musa certigis Hazan, estis unue atingi Aŭstralion kaj poste fidi je la propra bonŝanco. Ili eskapis de morto en Afganio, ili trovos vivon en Aŭstralio.

Kiam li ripetis tiun kliŝon poste al sia akompananto, Gul kapjesis, sed ne tre vigle.

Jen la plano. Sed kiel realigi ĝin? Subite la optimismo de Musa ŝrumpis.

Ali, deca homo, decidis helpi. Li diris al la du knaboj, ke se ili nepre volas riski boatvojaĝon, necesas zorge elekti la kontrabandiston. Ali foje aŭdis onidirojn, ke la plej humana el tiu gildo estas indoneziano kun la nomo Arif. Arif eĉ iom parolis hazardage, ĉar lia patro estis iranano, kiu tamen adoptis indonezian familian nomon. Iom pene Ali skribis la adreson de Arif. Li transdonis slipon al Musa, kaj deziris bonŝancon.

Ĉapitro 4 – Zaina

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 5 – Musa

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 6 – Zaina

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 7 – Musa

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 8 – Zaina

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 9 – Musa

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 10 – Zaina

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 11 – Musa

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 12 – Zaina

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 13 – Musa

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 14 – Zaina

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 15 – Musa

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 16 – Zaina

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 17 – Musa

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 18

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 19

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 20

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 21

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 22

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 23

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 24

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 25

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 26

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 27

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 28

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Ĉapitro 29

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi proveldono. La kompletan verkon vi povas mendi de <http://www.retbutiko.be/ero/iamt>

Kolofono

Titolo: *Iam ni trovos hejmon*

Aŭtoro: Trevor Steele

Serio: Stafeto n-ro 45

ISBN de la papera eldono:

9789077066805

UDK: 82.3.892

NUR: 300

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekenstraat 169 - 2060

Antwerpen

www.retbutiko.be

© 2023 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi ekzemplero de *Iam ni trovos hejmon* estas nekompleta versio. Ĝi povas esti distribuata senpage.

La serio „Stafeto”



En la serio „Stafeto” aperis:

1. Ĉu rakonti novele? (Johán Valano)
(bindita versio elĉerpita, ankoraŭ havebla kiel bitlibro)
2. Sub la signo de socia muzo (William Auld kaj Stefan Maul, red.)
3. Kazinski venas tro malfrue (Deck Dorval)
4. Beletro, sed ne el katedro (Gaston Waringhien)
5. Murdo en Esperantujo (Daniel

Moirand) (*bindita versio elĉerpita, ankoraŭ havebla kiel bitlibro*)

6. Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas (Manjo Austin)

7. Nigra magio (Deck Dorval kaj Christian Declerck)

8. Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ; (Adriaan Roland Holst)

9. Oktavia (Seneko)

10. Kromosomoj (Lorjak) („Baza verkisto”)

11. 1887 kaj la sekvo (Gaston Waringhien)

12. Dolĉe amare (Emile Van Damme)

13. Urd Hadda murdita! (Deck Dorval)

14. Meznokto metropola (Krys Ungar) („Baza libro”)

15. Ŝirpecoj (Christian Declerck)

16. Vojaĝoj kaj aliaj poemoj (Edwin de Kock) („Baza verkisto”)

17. Kanto pri minotaŭro (Gerrit Berveling)

18. Plena poemaro (Eŭgeno Miĥalski) („Baza libro”)

19. El sisma zono (Mikaelo Giŝpling) („Baza libro”)

20. Tri rakontoj pri la Miljara Paco (John Francis) („*Baza verkisto*”)
21. Sur Parnaso (Timothy Brian Carr)
22. Konto de l' vivo (Paul Gubbins)
23. La ŝtona urbo (Anna Löwenstein)
24. Kapturnoj (Higinio García)
25. Simptomoj (Gonçalo Neves)
26. La Bato (Lena Karpunina)
27. Sagao de Njal (nekonata aŭtoro; tradukis Baldur Ragnarsson) („*Elstara verko*”)
28. Tie, ĉi tie (Mikaelo Giŝpling) („*Baza verkisto*”)
29. Dormanta Hejmaro (Manashi Dasgupta; el la bengala tradukis Probal Dasgupto)
30. Bildoj pri norda lando kaj aliaj rakontoj (Sen Rodin)
31. Neokazinta amo (Lena Karpunina)
32. Sub fremdaj ĉieloj (Edwin de Kock)
33. Morto de artisto (Anna Löwenstein)
34. Kvazaŭ ĉio dependus de mi (Trevor Steele)
35. Flugi kun kakatuoj (Trevor Steele)
36. Paradizo stelita (Trevor Steele)
37. Konvinka kamuflaĵo (Trevor Steele)

38. Dio ne havas eklezion (Trevor Steele)
39. Amo inter ruinoj (Trevor Steele)
40. La fotoalbumo fermiĝas (Trevor Steele)
41. La konflikto de la epokoj (Edwin de Kock) („*Baza verkisto*”)
42. Kvin kverkoj kaj la sekvo (Christian Declerck)
43. Paulus fondinto (Trevor Steele)
44. La sangoruĝa flago (Trevor Steele)
45. La memoraĵoj de Julia Agripina (Anna Löwenstein)
46. Iam ni trovos hejmon (Trevor Steele)

Notoj

- *Baza libro*: baza, nepre leginda kaj legenda libro (laŭ William Auld).
- *Baza verkisto*: aŭtoro aparte rekomendita de William Auld.
- *Elstara verko*: verko kiu apartenas laŭ la Nobel-komitato al la 100 plej bonaj iam verkitaj.